

Heinrich Heine,
Lorelej'

*tradukita de Leopold
Elb*

*Tiu traduko estas po-
ste iom modifita de ali-
uloj, ne estas la origina
traduk-versio de Leopold
Elb.*

Heinrich Heine,
Lorelej

*tradukita de Ludwig
Lazarus Zamenhof*

Heinrich Heine,
Lurleia

tradukita de N. N. 01

Heinrich Heine,
Lorelay

*tradukita de Hans-
Georg Kaiser*

Ne scias mi, kial mi
estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia me-
mor'.

Vespero jam ekmalhe-
liĝas,
Fluadas la Rejn' en
trankvil',
La supro de l' monto
lumiĝas
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen
tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizaĝon kro-
nas
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi'.

...

Ne scias mi, kial subita
malgaj' en la koro na-
skiĝis;
el tempo jam enterigi-
ta
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l'
aero,
la Rejno mallaŭte ba-
bilas,
per oro de l'sun' en
vespero
la supro de l' monto re-
brilas.

Plej belan knabinon mi
vidas:
en ora ornamo brilan-
te,
sur supro de l' monto
ŝi sidas,
la harojn mistere kom-
bante.

La oran kombilon ŝi
movas
kaj kantas tra l' pura
aero,
kaj forto mirinda sin
trovas
en tiu ĉi kant' de
l'vespero.

...

Ignoro, quid id sibi
velit,
Tristissimus cur sim,
Antiqui aevi fabellam
Cur saepe volverim.

Vesperascit et friges-
cit,
Et Rhenus leniter it,
Cacumen montis lu-
cescit,
Dum Phoebus occi-
dit.

Sedet in summo mon-
tis
Virgo pulcherrima,
Auro nitet gemma
frontis,
Se pectit auricoma.

Aureolo pectine pec-
tit,
Carmen canens pro-
cul,
Mirandum id habet
modum
Nec non virilem si-
mul.

...

Min kaptas malgaj' en
la koro,
pro kio tia trist'?
Fabel' el antikva foro
ne lasas de mi kun per-
sist'.

Aere fridetas, trankvi-
las,
malhelas jam la Rejn'.
La monto surpinte bri-
las
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,
jen supre por ador';
la ora ornamo ridas;
ŝi kombas harojn el or'.

Ŝi kombas per ora kom-
bilo
kaj kantas kun pasi';
mirigas min la elbrilo
kaj forto de l' melodi'.

...

<p>Kaj sopiregon eksentas Ŝipisto dum sia vetur’; Rifaron li ne prientatas, Al monto rigardas li nur.</p>	<p>Ŝipet’ iras sur la rivero, ŝipisto ektremis de l’ kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kantanto.</p>	<p>In cymba navitam mille Angores feri tenent, Non videt scopulos ille, Ocli non si sursum vident.</p>	<p>Ŝipisto ŝipeton gvidas, lin kaptas ve’ de ekzalt’. Li ja la rifojn ne vidas’, li vidas nur supren sen halt’.</p>
---	--	--	---

<p>Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat’, Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad’.</p>	<p>Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l’ akvoturnado; ĝin Lorelej’ faris krue- la, per sia mirinda kanta- do.</p>	<p>Opinor undas devorare Nautam cum navicula, Effecit solo canendo Lurleia id dea.</p>	<p>Mi kredas, ke ondoj tiras la ŝipon funden de l’ Rejn’; kaj tio de l’ kant’ eliras de Lorelaj-siren’.</p>
---	--	--	---

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazararo Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Latinan de N. N. 01.*

Arg-2-179 (2010-02-11 14:00:52)

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)